Jacques Tuinder,

# Vojon ekiru

*La mond-karavano*

Vojon ekiru al
land' saturita de beno.
Revas mil miloj
sur vojo pri festa alveno.
Se pezas man',
helpos vin samidean':
Kunas ja kor' kun kompreno.

Urĝas tra montoj, en
valoj, kuraĝo kaj rido.
Lingvo komuna vin
ligas, fratec', forta fido.
En ĉies man'
glaso plenplena kaj pan':
Vi nur disdonu, homido.

Ĉerpu esperon el spert'
kaj inspiraj rakontoj.
Vin bonvenigas hejmlando;
jam freŝas la fontoj.
Do, man' en man'
marŝu la mond-karavan':
Ravos vin verd', horizontoj.

. . .

Dion kun homoj en paca
pilgrimo adoru.
Ankaŭ dum ploras l'animo,
kantante Lin gloru.
Sub Lia man'
mildas eĉ morto, malsan':
Venu, ho Regno, aŭroru.

*Verkinto de tiu ĉi Esperanta poemo estas Jacques Tuinder.*

*Arg-965-1945 (2014-02-04 23:08:44)*

*Tiu ĉi kanto aperis en la revuo "Dia Regno", n-ro 4(901), en la jaro 2013. La subtitolon "La mond-karavano" aldonis Albrecht Kronenberger. Ĝi estas kanteble laŭ la kristana religia kanto "Lobe den Herren". Pri la verkinto vidu la retejon* `http://eo.wikipedia.org/wiki/Jacques_Tuinder`.